

ESPERANTO PROVENCE

Numéro 79 - Janvier 2010

4 numéros par an

Vorto de la Prezidanto

Unu jaro finiĝas.

Kiom da kunvenoj, staĝoj, renkontoj, ĉiuj sukcesaj! Mi despli feliĉe travivis plurajn rilatantajn impresojn pri la ekzisto de Esperanto-Provence, kiel grava kontribuanto al tiuj diversaj agadoj, vizitintoj, ferioj. Ŝajnas al mi, ke ni estas sur la ĝusta vojo.

Mi esprimas al ĉiuj miajn bondezirojn por la nova jaro 2010.

Pierre OLIVA



Federacia Kongreso en MANOSQUE la 8an kaj 9an de majo 2010

Maison des Associations. Séjour à l'Hôtel Bel Air 04 92 72 66 82, repas tiré du sac ou au Flunch. Au programme : conversation et en parallèle de 10 à 12, de 14 à 16 et de 16 à 18, conférences-débats sur l'écologie, la psychologie ou la Russie (faites-vous connaître auprès de la secrétaire, Monique Arnaud si vous voulez proposer un thème). Le soir, concert de Franz, sans oublier dimanche la visite de la ville et la rue Zamenhof.

Renseignements auprès de José Grammatico,
josephgrammatico@neuf.fr ou 04 92 72 39 89

*Le bulletin d'adhésion paraîtra
dans le numéro de printemps de «Espéranto-Provence»*

Le nouveau blog d'Espéranto-Provence

Dum la lasta komitatkunsido en septembro, Franz Mimmersheim el Villeneuve(04) estis komisiita starigi blogon por nia asocio. Ĝi celas informi pri esperanto, sed ĉefe pri la vivo en nia regiono, aŭ la diversaj uzoj de esperanto. Vizitu ĝin, sed ĉefe sendu informojn, raportojn, artikolojn por nutri ĝin. Nia amiko pretas surtigi sed ne mem verki.

Pour faire vivre le nouveau blog d'Espéranto-Provence, vous êtes invités à faire connaître les rencontres ou les événements de votre ville ou département, proposer des articles dans les deux langues à Franz Mimmersheim. Et bien sur, le faire connaître et le consulter :

<http://esperanto.provence.free.fr>

ASSEMBLEE GENERALE D'ESPERANTO-PROVENCE

dimanche 9 mai 2010 à 9 h 30

à Manosque, Maison des Associations

L'ordre du jour paraîtra dans le prochain bulletin. Appel à candidature pour le Conseil d'Administration : se faire connaître auprès de la secrétaire : Monique Arnaud - monique.arnaud@aliceadsl.fr

EXAMENS d'ESPERANTO

Ils auront lieu le dimanche 6 juin, à Marseille, Collège Pasteur.

Plus de détails dans le prochain numéro.
Renseignements triolle.renee@wanadoo.fr

Espéranto hors les murs

Jeudi 28 janvier à 15 heures, visite du Musée Aicard à La Garde(83) près de Toulon.

Sous la conduite de Jean-Pierre Dubois, nous visiterons cette bastide provençale où plane l'âme de l'écrivain, publiciste et critique Jean Aicard, contemporain de Zamenhof, ainsi que le jardin et l'atelier de son ami peintre, Paulin Bertrand.

Possibilité de covoiturage.

Informations: Renée Triolle : 04 42 71 42 74
et triolle.renee@wanadoo.fr

STAGE INTENSIF d'ESPERANTO au CASTELLET les 23 et 24 janvier

Dix heures pour se familiariser avec la langue internationale, sa structure, ses utilisations.

Accueil samedi à 9 heures, cours de 9 à 12 et 14 à 17.

Inscription (30 euros comprenant le matériel pédagogique) auprès de Pierre Oliva :
nlpo@free.fr ou 99 Eden Parc, 2772 Montée du Vieux Camp - 83330 LE CASTELLET

Fête Zamenhof : si toutes les années divers groupes dans le monde rendent hommage à l'initiateur de la langue internationale, le Docteur Zamenhof, cette année Google affichait le drapeau espéranto sur sa page d'accueil le 15 décembre ! Et le choix de la date a permis de festoyer à Avignon le 13 décembre et Saint-Raphaël le 20.

**Pri Avinjono, raportas
Nina Korjenskaja**

La 13an de decembro, Avinjona Esperanto-Klubo organizis la 31an zamenhofan tagon. Kiel kutime venis geesperantistoj el la tuta regiono kaj la etoso estis tre amikeca, preskaŭ familia. Matene ni aŭskultis tre riĉenhavan prelegon de Patrick Lagrange : « Darwin : ĉu li ĉiam aktualas ? » kaj ni povis konkludi, ke Darwin restas ĉiam fidinda, en la kondiĉoj de nia planedo Tero.

Post gaja tagmanĝo okazis spektaklo, enhavanta rakontojn, fabelojn, multajn sketĉojn kaj komunan kantadon ; ĉio preparita kaj organizita de avinjonaj esperantistoj, gvidataj de Rose-Marie Quintin. Jam de pluraj jaroj, kursanoj praktikas teatron ; ĝi estas bona metodo por studi la lingvon sed krom tio, kompreneble, la ak-

toroj kaj la publiko ĝuas la spektaklon !

Dankojn al ĉiuj organizantoj kaj partoprenantoj pro tre agrablaj momentoj.



*Patrick Lagrange (dorse)
interese gas la atentemajn aŭskultantojn*



La grupo en la zamenhofa strato

**Pri Saint-Raphaël raportas
Monique Prezioso**

La festo komenciĝis per depono de floroj ĉe strato Zamenhof. Sekvis amika manĝo en le Renouveau (bone konata de tiuj, kiuj partoprenas la semajnon en Agay). Gilles kaj Nicole prezentis diaporamon pri sia vojaĝo al Tunizio, Catherine rakontis pri agrabla staĝo en La Chaux de Fonds (Svislando) dum Jean-Claude raportis pri zamenhof-prelego en Svislando. Sub la majstra gvidado de Christine, Carmen kaj Monique, la tuta grupo kantis aŭ aŭskultis anekdotojn.

Japanoj vizitis La Ciotat

Veninte al Rotterdamo okaze de la Malferma Tago de la Centra Oficejo de UEA en Rotterdamo, kun la celo partopreni ankaŭ la Internacian Semajnon en Germanio fine de decembro, Masumi kaj Tacuo el Kioto deziris viziti Francion. Evidente, ili estis tuj « kaptitaj » por prelegi en diversaj francaj urboj kaj montri al la publiko, ke esperanto

bele funkcias eĉ kun Azianoj. Sekve ili haltis en La Ciotat (inter Luksemburgio kaj Katalunio, tiel kalkulas la vojaĝemaj esperantistoj!). Ili prezentis al la publiko la arton enpaki donacojn en tukon. *Froŝiko* estas malpli konata ol *origami* kaj ĝi levis entuziasmon ĉe la vidantoj (esperantistoj aŭ ne). Per kelkaj nodoj, Masumi transformis tukon en sakon, dorsosakon, sakon por transporti

akvomelonon ne parolante pri pakado de unu botelo (tre romantika) aŭ du samformataj boteloj (tre praktika). Ankaŭ pako de du libroj iĝas tre eleganta mansako. En tiu donacperiodo, homoj trovis belan eblecon ekologie kaj originale prezenti donacojn. Tiu malnova tradicio (ĝi naskiĝis en la publikaj banejoj, kie granda tuko ricevis la malpurajn vestojn) restas tre vivanta hodiaŭ. Ni ne dubas, ke la ĉeestantoj provis mem prezenti siajn donacojn tiamaniere, ekologie savante paperon, rubandojn, glupaperon, des pli, ke oni redonas la tukon al la donacintoj. Eĉ monon eblas enpaki elegante okaze de edziĝo, naskiĝo de la unua filo aŭ

morto. Bela ebleco konatiĝi kun alia kulturo, kiun majstre prezentis Tacuo dum lia edzino manipulis la tukojn. Bona okazo por la neesperantistoj parte kompreni la lingvon.

Se ni aldonas, ke esperantistoj, eĉ komencantoj, povis paroli kaj kompreni okaze de amikaj tag- aŭ vespermanĝo, kaftrinkado aŭ ekskurso sur la montoj aŭ la muzeo, ni plene profitis de ilia restado, same kiel ili profitis de netipa domo kaj regiono. Dankojn al Esperanto-France, kiu kreis tian okazon.



Masumi transformis tukon en diversaj aĵoj

Raporto pri la semajfino en la Ciotat
Daniel Moirand skribas al esperantista amiko

Kara amiko,

Imagu, ke antaŭ kelka tempo, mi partoprenis esperantan semajnofinon. Tio okazis en la Ciotat, la 27-an kaj 28-an de novembro. Pri tiu aranĝo mi legis en Esperanto-Provence, kun ĉiuj eblaj detaloj. Do mia edzino kaj mi decidis viziti tiun rendezuon.

Laŭ la gazetaj informoj, kiuj speguliĝis poste en la realeco, kvar kursoj okazis : pri la unua nivelo (komencantoj) zorgis Renée Triolle; pri la dua – Monique Arnaud; pri la tria Katalin Faragó. Arlette Plutniak interesigis siajn klientojn pri jogo.

Nia kunvenejo estis la tiel nomata Maison des Jumelages – malnova provenca domo, tre agrabla, apud la urba naĝejo. Tiu loko aparte plaĉis al mi pro sia iomete antikva atmosfero. Ĝi estis bele kaj trafe renovigita kun granda halo por akcepti la alvenantojn. Vasta salono donis la eblecon kune manĝi al kvardek voremaj partoprenantoj.

La kursoj tuj komenciĝis sabate je la 10-a matene. Ili daŭris ĝis tagmezo. Ni retroviĝis en la laborĉambroj posttagmeze. Kafa paŭzo rompis tiun laborplenan etoson, post kio plia kurso donis al ni la okazon atingi la vesperan manĝon.

Mi ĉion ŝatis ĉar simpla sed abunda mangaĵo ĉiam sufiĉas al mi.

Mi partoprenis la kurson de Katalin Faragó. Ŝi parolis pri sia patrolando Hungario, kaj ŝi provizis nin per historiaj kaj geografiaj donitaĵoj.

Post la sabata vespera manĝo, je la oka, Arlette kaj Edmond Plutniak prezentis al ni filmon pri siaj travivaĵoj en la transsiberia trajno. De Moskvo ĝis Vladivostoko, ili dum tuta semajno vivis kun aliaj Esperantistoj por atingi la UK-on, kiu okazis en Jokohamo / Japanio. Ni eliris el tiu prezentado kun menso plena je rejloj, lagoj kaj lokaj

foraj Esperantistoj...

Post iom da babilado, ni disiĝis por atingi niajn ĉambrojn. Ankaŭ tie, ĉio estis simpla sed tre agrabla.

Sabate, la 29-an de novembro

Post (feliĉe) ne tro frua ellitiĝo, matenmanĝo rekunigis nin en la vasta salono de la teretaĝo. Tuj poste, ĉiu direktis sin al sia laborloko kaj ĝis tagmezo, ni denove laboris, parolis aŭ aŭskultis. Lasta komuna tagmanĝo denove kunigis nin ĉiujn lastan fojon.

Post tiu manĝo, la intenco estis viziti la urbon la Ciotat, sed la vetero ne tro inklinis nin al tiu vizito : fajna pluveto komenciĝis kaj pluraj decidis tuj forveturi. Nur Renée Triolle kun siaj komencantoj plu laboris. Nia paro anstataŭe decidis sekvi Pierre Oliva al apuda ark-pafejo. Li tie montris al ni la teknikon de tiu sporto. Mi agnoskas, ke la afero estas tute malfacila !

Je la 17-a, ni decidis retroveturi hejmen al la monto Luberon, kie ni loĝas. Pere de la aŭtoŝoseo, ni rapide kaj senprobleme atingis nian celon. Mi (fakte, ni) estis tre kontenta(j) pri mia tiea restado, kaj ĉiuj opinioj, kiujn mi aŭdis en la grupo spegulis la saman opinion.

Gratulojn al ĉiuj, kiuj preparis tiun renkontiĝon : mi scias, ke Renée estas unu el la ĉefaj instigantoj de tiaj rendezuoj – brave al ŝi !

Kara samideano, mi tre konsilas al ci partopreni en tiaj estontaj aranĝoj se la ebleco prezentiĝos: tio estas bona okazo revidi amikojn, praktiki la lingvon kaj ĝui Esperantan etoson.

Plej samideane,

Daniel Moirand

P.S. - Relegante mian letereton, mi konstatas, ke mi forgesis kelkajn aferojn :

- * la ĉeestantoj venis el ĉiuj provencaj departamentoj
- * ni plurfoje esperante kantis post la manĝoj – Arlette instigis nin tion fari.
- * Ekster sia kurso pri Hungario, Katalin Faragó zorgis pri japana masaĝo, kiun ŝi propagandas. La detalojn pri la personoj, kiuj spertis tion mi ne konas, kaj do mi ne povas paroli.
- * okazis "kunsido" de la membroj de Esperanto-Provence, por iomete prepari la venontan regionan kongreson. Ĝi okazos en Manosko la 8-an kaj 9-an de majo 2010. Pliajn in-

formojn ni ricevos pere de nia loka ligilo.

- * Monique Prezioso propagandis pri la Esperanta (tutsemajna) kunveno en Agay, venont-februare : ŝi allogis plurajn personojn, inkluzive de ni.

Plej verŝajne mi forgesis malmulton pri tiu simpativeka renkontiĝo.



La grupo antaŭ la laborlokoj

*Ili ĉiuj estas tre kontentaj...
Ĝis la venonta jaro ?*

Esperanto Club St Raphael-Frejus organise la "Reĝkuko" le 23 Janvier à 14h suivi de l'Assemblée Générale du club. Pour ceux qui desirent etre plus longtemps en esperantio possibilité de manger ensemble (repas tiré du sac) à partir de 12h. renseignements : Monique 0494830688 ou lprez@voila.fr

Vivo en la grupoj

LA ROQUE d'ANTHERON (13): regulaj trinivelaj kursoj kaj preparo de la ĉerizfestoj.

GAP (05): monata konversacia rondo anstataŭ semajna kurso.

MANOSQUE (04): Membro-Kunveno la 29an de januaro en Maison des Associations; «café polyglotte» planita 04 92 72 39 89 kaj 04 92 73 38 14

Eksteraj rilatoj

EMBRUN (05): la grupo de Gap partoprenis la biofoiron en oktobro. Bona okazo sin turni al alternativuloj, kiuj provas solvi diversajn problemojn sed eble ankoraŭ ne pensi pri la lingva.

TOULON (83): en relais Socio-Culturel Peiresc, la 3an de decembro, Renée Triolle prelegis pri la lingvo-problemo en Eŭropo kaj justa solvo per esperanto. Malgraŭ la aĉega pluva vetero kaj averto de kelkaj, ke ili devos foriri je la 19a, je la 20a finiĝis la prezento pro neceso fermi la lernejon!

PARIZO (75): Kial raporti pri Parizo en la vivo de nia regiono? Ĉar ambaŭ federacioj, Monique Arnaud por Internacia Ligo de Esperanto-Instruistoj kaj Renée Triolle por Universala Esperanto-Asocio partoprenis en oktobro la Ĝeneralan Konferencon de UNESKO. Okazo fari kontaktojn kun oficialuloj aŭ NeRegistaraj Organizoj, informi pri esperanto, atentigi pri la lingvo-diskriminacio, ktp.

Partopreno en la esperanto-vivo

Pierre kaj Monique Prezioso partoprenis la aŭtunan Katalunan Semajnon en la Pineda de Mar. En agrabla hotelo kun bona manĝaĵo, tiu semajno estas unika okazo praktiki la lingvon nur distre kaj ekskurse. Tamen elstaris la premio de Katalin Kovats, kiu ricevis premion Ada Sikorska-Fighiera kaj gvidis kurson pri «Vivo kaj laboro de Vincent van Gogh».

Pierre Oliva kaj Nicole Lafitte festis la novan jaron en la Kulturdomo Gresillon. Denove okazo praktiki la lingvon, amuziĝi kaj kontribui al la vivo de la kastelo, minacata de financaj kaj alispecaj problemoj. <http://gresillon.org>

Kelkaj kulturaj informoj

Musique: Vinilkosmo, kiu apud Tuluzo laboras por konigi la plej diversajn muzikistojn de la tuta mondo eldonis novan katalogon. Vidu: <http://www.vinilkosmo.com>

Casse-têtes: de nia amiko el Marseille Jacques Ferroul, malkovru: <http://www.polyformes.net>

Medicine: dictionnaire médical esperanto-français et français-esperanto: <http://vortareto.free.fr/index.htm>

Traduction automatique: <http://vikitraduko.saluton.dk> ou <http://vortareto.fr>

ATTENTION : ce bulletin est le dernier que vous recevez si vous ne vous êtes pas acquitté de votre abonnement (5 euros) à payer indépendamment de la cotisation à Espéranto-Provence. Merci de faire le nécessaire avant le 5 février auprès du trésorier.

Lui faire savoir par courrier ou par courriel.

Michel Cerisay, Résidence Trident Sud H, 15 Place des Vents Provençaux - 13140 MIRAMAS ou mcerisay@gmail.com

Merci à Bernadette Deschanel qui assure la mise en page de ce bulletin qui cherche toujours un rédacteur (l'intérim est assuré par Renée Triolle). Faites lui savoir si la formule vous convient, si vous cherchez autre chose. Et surtout, n'hésitez pas à contribuer : triolle.renee@wanadoo.fr ou Renée Triolle, Bello Bauco, 694 chemin de la Civade Verde, 13600 La CIOTAT

Informations sur les prochaines rencontres

- Congrès d'Espéranto-France à Kaiserlautern en Allemagne du 21 au 24 mai. info@esperanto-france kaj www.esperanto-france.org
- Congrès de SAT-Amikaro, 3-6 avril à HILLION (Bretagne) : leveque.franjo@gmail.com
- Cheminots Français : du 19 au 24 mars à NANTES (inscription avant le 15 février) : jeanripoche@wanadoo.fr
- Cheminots Internationaux du 8 au 15 mai à SOFIA (Bulgarie) : www.ifef.net
- Médecine (ouvert à tous) 17a Internacia Medicina Esperanto-Kongreso à SZEGED (Hongrie) : www.yumeiho.hu
- Informations sur les événements en France : <http://esperanto-jeunes.org/local>
- Italiens : du 21 au 28 août à LINJANO SABBIA D'ORO (entre Venise et Trieste) : kongreso@esperantoitalia.it; <http://italakongreso.esperantoitalia.it>